



JUNIO 2012



N° 131

La « Espéranto-Gironde » Informilo

Dimanĉon la 30an de septembro 2012.

Kio okazos ?

Nia ĜENERALA ASEMBLEO

Kie?

**En la sidejo de nia asocio, la kastelo PALMER
en CENON.**

Kiel?

De la 11a horo kun pikniko alportita de ĉiuj

Pliaj informoj alvenos pli malfrue, sed de nun rezervu tiun tagon, ĉar ŝanĝoj intervenos en la estraro. Vidu paĝon la 10an.

LA BURDIGALA FOIRO



Ne estis la unua fojo, kiam ni estis vizitantaj la foiron, sed ĉifoje ni partoprenis, kun skipo de Esperanto-Gironde, en la deĵorado pri budeto, kiu informis pri la universala lingvo. La budo estis ja tre malgranda: du paneloj por alglui afiŝojn kaj informojn, du seĝoj kaj eta ronda tablo. Iu el la grupo alportis bretaron por prezenti nian dokumentaron.

Ni devis deĵori vendredon matene, do ni vizitis la foiron nokte merkredon vespere por situigi la lokon. Tie ni renkontis nian amikon Gerardo (la meblisto), per kiu ni akiris la rajton starigi budon en la foiro. Li estis vere stratvendisto, alvokinta la junajn pasantojn por « vendi » la lingvon. Ni admire rigardis lin, sed ni dubis pri nia kapableco fari same dum nia deĵorado.

Dum tiu vespero okazis bela teknikajo kiun ni ĝuis.

Vendredon matene ni alvenis surloke kelkajn dekojn da minutoj antaŭ la malfermo. Ni trovis la ĵurnalon sur la tablo, ni algluis kelkajn pliajn afiŝojn, kaj ni atendis la « klientojn ». Malfeliĉe (?) la plejmulto de la vizitantoj jam sciis pri la ekzisto de Esperanto, sed tamen ni disdonis kelkajn dokumentojn al nesciantoj.

Ni atendis la alvenon de Marcelo, Claudine kaj ge-Lafosse por iri tagmanĝi, kaj denove zorgis pri la budo dum ilia manĝo. Poste, ni vizitis la ekspozicion pri Japanio.

Ni opinias, ke se ni estos sufiĉe multnombraj, estos bone se ni povos denove ĉeesti la foiron senpage. Kaj eble, kun plejfrua alvoko, ni povos havi respondojn de niaj samideanoj de la ĝemeligitaj urboj de Burdigalo (aŭ Burdeo).

Bernardo kaj Rose

ESPERANTO EN LA FOIRO

Ĉi-jare, nia asocio rajtis starigi budon en la internacia foiro de Bordofo.

Nia budo staris en la internacia salono kie multaj landoj provis vendi siajn varojn.

Ni estis en speciala areo kune kun la internaciaj asocioj kiuj ĉefe zorgas pri la sanitara helpo. Iniciatis la aferon nia amiko Gerardo, lernanto en Galgono, kiu ekspoziciis kiel meblisto. Li rilatis kun la direktorino de la foiro kaj senpage ekhavis nian partoprenon.

La asociaj budoj situis proksime de scenejo kie, de tempo al tempo, okazis prezentadoj: dancoj, muziko... Tiuj animadoj amasigis la homojn apud ni; tamen ni devis alpaŝi al la vizitantoj por paroli kun ili pri Esperanto kaj disdoni niajn informilojn. Kelkaj tamen spontane venis al ni; ofte tiuj personoj jam konis esperanton pere de familianoj. Kelkfoje ni suferis pri la bruado de la sonsistemo; la laŭtparoliloj kraĉis tro da decibeloj!

Ĉar ĉi-jare la foiro honoris Japanion okaze de la 30a datreveno de la Ĝemeligo de Bordofo kun Fukuoka, mi kontaktis esperantistajn loĝantojn de la regiono de Fukuoka. Unu el ili malavare sendis al mi belajn fotojn pri la naturo kaj pri la ĉiutaga vivo en Japanio. Ni kroĉis kelkajn por ornamo nian budon; kaj por niamaniere partopreni en la evento!

Ĉu nia ĉeesto efikis? Ni ne scias; sed ni semis kaj semis!

Ĉu la foiro estas taŭga loko por informi pri esperanto?... Ni parolos pri tio kun la geamikoj kiuj konsentis deĵori unuj post la aliaj, dum 5 tagoj; pri tio mi deziras danki Bernard, Rose, Marcel, Claudine, Bruno, Gloria, Annick, Pierre-Yves kaj Jean-Claude. Pri tiu temo, kaj pli ĝenerale pri propagando, ni debatis okaze de nia ĝenerala asembleo, en septembro, en Cenon.

Sed, ekde nun, mi deziras al ĉiuj tre agrablan someron!

Joël



EN LA FOIRO EN BORDOZO.

Sandra, juna lernantino en la galgona kurso, raportas pere de skribitaj notoj.

* * * * *

Hodiaŭ, dum la kurso, ni parolis pri la foiro ĉar ni instalis la E-budon. Ĝi konsistis el ronda tablo kaj tri seĝoj kaj du vertikalaj paneloj. Sur ili ni gluis kelkajn afiŝojn pri esperanto kaj ankaŭ kelkajn fotojn el Japanio.

Al la vizitantoj ni proponis broŝuretojn kaj dokumentojn per komputilo. Bruno estis tiu kiu spertis pri tio.

En la foiro ni ne renkontis veran esperantiston, sed ni renkontis virinon kiu eklernis la esperantan lingvon en la lernejo, kaj personojn kiuj jam aŭdis pri Esperanto.

Niaj vizitantoj faris demandojn aŭ rimarkojn; ni devis respondi:

1- Kiom da homoj parolas esperanton (aŭ esperante!)?

- Pluraj milionoj da homoj parolas esperanton!

2- Esperanto estis bona ideo, sed nun, ĝi ne plu funkcias!

- Esperanto estas vivanta lingvo. En la tuta mondo, multaj asocioj estas agemaj. Ili proponas kongresojn, kursojn, librojn, diskojn, korespondantojn kaj diversajn aranĝojn!

La internacia organizo pri kulturo, UNESKO, uzas esperanton. Ĝi eldonas revuon en esperanto. Ĉiujare homoj eklernas la esperantan lingvon. Multaj retejoj uzas esperanton.

3- Nun, la internacia lingvo estas la angla lingvo!

- En la pasinteco estis la franca, kaj en la estonteco eble estos la ĉina ĉar ja ekonomio altrudas la lingvon!

- Malmulte da homoj bone regas la anglan.

- Esperanto estas dua lingvo por ĉiuj homoj; ĝi estas egaleca. La elekto de la angla kiel internacia lingvo privilegias parton de la homaro (britoj, usonanoj, aŭstralianoj...)

Sandra



RODICA EN CENON

Ni akceptis Rodica, rumanan esperantistinon, en la kulturcentro de Palmer.

Ĉar ŝi estas la nuna prezidantino de IFEF (Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj), ni ĉefe parolis pri la komuna kongreso IFEF-Esperanto-France kiu okazos venontjare en Artigues.

Ŝi ĵus estis vizitinta la kongreslokon; ĝi multe plaĉis al ŝi.

Ŝi atentigis nin pri la fakto ke, de kelkaj jaroj, ne plu estas specialaj tarifoj por la samideanoj el la orienteŭropaj landoj; kaj, pro manko da mono, multaj esperantistoj rezignas partopreni en internaciaj kongresoj. Ŝi intencis paroli pri tio kun la francaj organizantoj.

Posttagmeze, Rodica prelegis en la moderna mediateko de Cenon. Preskaŭ 30 personoj ĉeestis; kaj inter ili sidis dekduo da junaj rumanoj kiuj vivas kaj studas en Bordojo.

Vestita per tradiciaj vestaĵoj kiuj iam apartenis al ŝia avino kaj al ŝia patrino, ŝi parolis pri sia lando.

Ni multe lernis pri historio, geografio, arto kaj pri la nuna ĉiutaga vivo en Rumanio. En tiu lando, la averaĝa salajro sumas 150 eŭrojn. Rodica kiel pensulino ricevas monate 250 eŭrojn; sed ŝi ankoraŭ profesie laboras, kiel psikologino en privata kliniko, por pagi siajn eksterlandajn vojaĝojn.

Ni trapasis tre agrablan momenton des pli ke la akcepto en la mediateko estis ege afabla. Ni dankas la oficistinojn!

Joël

KARMEN SUR RELOJ ...

Finiĝis la INTERKANT' staĝo en Grésillon, de la 17a ĝis la 20a de majo.

Malgraŭ, (aŭ dank'al ?) vetero ne tre varma, ni multe laboris, matene kaj posttagmeze en gaja, sed tamen serioza etoso, sub la paŝtbastoneto de Franjo, nia korestrino, helpata de Zdravdka solistino kaj Murielle lerta pianistino.

Kvardeko da kantistoj provis perkere kanti (same kiel elmontris al ni la infanoj). La rezulto vidiĝos dum venontaj provkantoj. La ĉefa okazos en novembro en Kvinpetalo en Bouresse, kie ni laboros pri la enscenigo. Intertempe ni laboros pri la kantoj hejme, kompreneble.

De nun 4 koncertoj estas planitaj por 2013:

- 30-31 marto/1a de aprilo - Pasko en Metabief (Jura) dum Sat-Amikara kongreso.
- 4-10 majo - Ĉielaliro en Artigues-apud-Bordeaux dum IFEF kaj UFE kongreso.
- 22-23 junio en Bouresse.
- tria semajno de aŭgusto en Plouëzec.

Eble 5a koncerto en novembro en Mirepoix (Ariège)

Krom la kantoj, ni eksciis pri la skemo de la spektaklo, t.e. parolaj intervenoj de Franjo klarigantaj la historian, socian, kulturen kuntekston de la opero, de la vivo de Bizet... Tiuj intervenoj estos ĉu en Esperanto, ĉu en la franca, dependos de la publiko.

Ni atendas unu aŭ du aliajn tradukojn kaj du aŭ tri dancojn.

« Ni ja konstatis ke la spektaklo formiĝas, ke nia laboro donas pozitivan rezulton, kaj ĉiuj foriris kun optimisma sento, ke ni certe sukcesos prezenti valoran spektaklon », skribis Manjo.

Kaj mi tute konsentas.

Monique



PLUEZEK- ESPERANTO

Association loi de 1901

5, Hent Toul Broc'h

22470 PLOUEZEC

Tel : 02 96 35 73 06 // 09 62 32 57 45

Chers amis

Toute l'équipe de Plouézec-Esperanto vous souhaite une excellente année 2012, pour vous et votre famille. Santé, plein de projets et du dynamisme pour faire connaître la Langue Internationale. Ĉion bonan por vi.

Mr **RAZEN MANANDHAR DU NÉPAL** qui sera cette année notre invité d'honneur enseignera et nous fera une conférence sur son pays,

Cours de 9h à 12h

- A : enfants de 7 à 12 ans : **NIAN & PAULINE**
- B : 1er niveau : **Perla MIELO & Elisabeth LEDRU**
- C : 2^{ème} niveau : **Claude & Anne JAUSIONS**
- D : 3^{ème} niveau : **Rodica TODOR (Rumanio)**
- E : conversation : **Razen MANANDHAR (Népal)**

Ateliers de 17 h à 19 h

- Yoga : **Marie SAVARY**
- Chorale : **Perla MIELO (Hungario)**
- Théâtre : **Laurent PEUCH**
- Dessins Celtiques : **Jeannine ROYOU**
- Jeux en esperanto : **Elisabeth LEDRU**

Excursion prévue : Visite d'un élevage apicole & du sentier musical à Cavan.

L'inscription comprend : **L'Adhésion à l'Association « Pluezek-Esperanto »**

L'accès aux cours et ateliers (sauf informatique)

Le repas du samedi soir

Des examens 1^{er} et 2^{ème} degré sont organisés tous les ans par Anne et Claude JAUSIONS ;

Les examinateurs demandent que les candidats s'exercent à la dictée

Un service de librairie sera ouvert pendant la durée des Rencontres.

LOGEMENTS : Centre d'accueil « L'Artimon » réservation au N°02 96 16 43 33

Camping Municipal : N° 02 96 20 64 90 // 02 96 22 72 92

Camping « Le Launay » N° 02 96 20 63 15

Camping « Le Cap Horn » N° 02 96 20 64 28

Liste des loueurs : Mme CORGNOU Josette, N° 02 96 22 79 91

Fin juin, nous ferons parvenir aux personnes inscrites un courrier pour dernières informations concernant les cours, les ateliers, et, très important les modalités d'inscriptions aux forfaits repas qui vous seront proposés aux tarifs de ; 60 € midi ou soir et 120 € en forfait total ; vous pourrez alors confirmer vos choix.

L'accueil se fera à partir de 14 h à la salle des fêtes !

Inscription et règlement : à l'ordre de « **Plouezec-Esperanto** »

Mme **GALLIAN** Micheline, 28 rue Yves Le Coq 22470 PLOUEZEC, tel : 02 96 16 43 74

Micheline.gallian@orange.fr // www.esperanto.over-blog.net

En cas de difficultés financières : Mr & Mme **DUBOIS** : tel : 02 96 35 73 06 le soir

marbordo22@yahoo.fr pluezek@gmail.com // site : www.pluezek-esperanto.net

L'inscription ne sera validée qu'après réception du règlement !

N'hésitez pas à nous contacter si vous souhaitez des informations complémentaires.
N'hésitez pas non plus à nous faire part de vos propositions pour une meilleure animation de ces journées. Tutkore salutas vin la pluezeko skipo.

Jean-Claude DUBOIS : Présidanto de Pluezek-Esperanto

KVINPETALO - "Programo 2a semestro 2012 15 rue du Lavoir—fr 86410 BOURESSE

Julio 20a-28a: **Muzika Staĝo**, kun Markov-familianoj

Dum tiu ĉi staĝo esperanto estos praktikata pere de muziko : libera aŭ plurvoĉa kantado, orkestra muziko, kaj diskutoj pri la kreokunteksto de la prilaborataj verkoj, paralele kun unuagrada kurso por komencantoj. La staĝo finiĝos per koncerto, sub la gvido de Lino Markovo, profesia muzikisto.

Julio 28a-Aŭgusto 4a: **Praktikado de la lingvo (1a kaj 2a nivelo)**, kun **Lala Ralalarisoa kaj Karlo Bourlot**

Lala Ralalarisoa, el Malagasio, prizorgos la komencantojn, dum Karlo Bourlot, el Italio, gvidos lingvopraktikan kurson por progresantoj.

Oktobro 25a-28a: **Praktikado de la lingvo per Tinĉjo-bildstrioj**, kun Michel Dechy

Uzante, regule ekde kvin jaroj, la albumon Tinĉjo en Tibeto en siaj Esperanto-kursoj (2a nivelo), Michel kunigis tiun laboron en libra formo : « La bildstrioj kiel lernolibroj », aperinta en 2010. Michel montras al ni kiel utiligi tiun libron, ilustritan per bildoj el la verko de Hergé, plivalorigita per fotoj kaj situacioj ebligantaj trakti temojn kiel sporto, amaskomunikiloj aŭ niaj naciaj kaj regionaj festoj, por logi al Esperanto diversspecan publikon.

Novembro 1a-4a: **Provludo de Interkant' pri Karmen'**, kun apartaj aliĝkondiĉoj.

Se vi interesiĝas pri tiu ĉi staĝo, kontaktigu rekte kun Manjo Clopeau, 12 rue de la Drisse, 56450 Theix, 02 97 68 98 57, <manjo.clopeau@wanadoo.fr>

Maison Culturelle de l'ESPERANTO **Château de GRESILLON** **49150—SAINT MARTIN D'ARCE**

La Maison Culturelle de GRESILLON propose des séjours dans le château du 21 juillet au 20 août 2012.

Vous pouvez choisir la durée de votre séjour (tarif journalier), ou rester toute la semaine (forfait tout inclus).

Vous pouvez participer à un stage hebdomadaire pour apprendre la langue ESPERANTO (70 €), participer uniquement aux activités culturelles (35 €), ou passer de bonnes vacances en Anjou.

Choisissez votre formule !

Rememorigo, franclingve, de la artikolo 4 de niaj statutoj

« Organisation :

- a) un bureau de trois membres (président, secrétaire, trésorier, assistés éventuellement d'un adjoint pour chaque poste) est élu pour un an, et s'occupe de toutes les questions relatives à la vie de l'association sur la base des statuts.
- b) une assemblée annuelle de tous les adhérents renouvelle le bureau. Les membres sortants sont rééligibles. Les décisions sont prises à la majorité des présents. »

La estraro alvokas kandidatiĝojn por la Ĝenerala Asembleo, kiu okazos dimanĉon la 30an de septembro 2012, ĉe la sidejo de Esperanto-Gironde, en la kastelo Palmer en Cenon. Plù da informoj alvenos poste.



ŜANĜO EN LA ESTRARO

Ni anoncis baloton, okaze de nia venonta ĝenerala kunsido .

Ĉar mi fariĝis prezidanto de nia asocio en oktobro 2001 – de jam 11 jaroj !- mi deziras lasi la postenon al anstataŭanto aŭ anstataŭantino. Li aŭ ŝi kunportos novan energion, novajn ideojn kaj novajn planojn. Mi arde esperas ke volontul (in)o manifestiĝos antaŭ septembro.

Mi tamen intencas resti aktiva en nia asocio kaj eventuale helpos la novan estraron.

Joël

La romano de Renardo (sekvo kaj fino de la prologo)

Damo Hersent, digna edzino de la latrono Izengreno, perfidkora, krud-kaj kuperoz-vizaĝa, donos pro sama kialo sian nomon al la lupino. La unua estis same nesatigebla kiel la alia estas glutema: samaj dispozicioj, sama karaktero; konsekvence filinoj de sama patrino. Tamen, necesas konfesi, ke neniam estis vera parenceco inter la lupo kaj la vulpo: malgraŭ tio, kiam ili sin vizitis kaj havis komunajn interesojn kaj entreprenojn, la lupo ofte alparolis la vulpon kara nevo, la alia nomis lin sia onklo kaj sia baptano.

Pri la edzino de Renardo, Damo Richeut, eblas diri, ke koncerne malsincerecon ŝi neniel malsuperas la vulpinon kaj, se unu estas miele vinagra, la alia estas vinagre miela. Neniam oni vidis du plej harmoniajn parojn, sama inklinio al ruzo ĉe Renardo kaj la vulpo, sama rabemo ĉe la vulpino kaj Richeut.

Kaj nun, Moŝtoj, ĉar vi konas la lupon Izengreno kaj la vulpon Renardo, ne miru malkovri tie-ĉi, ke la lupo kaj la vulpo parolas, kiel siatempe parolis Izengreno kaj Renardo. La monaĥoj apude loĝantaj rakontas, ke sama afero iam okazis al la azenino de profeto laŭdire nomita Bileam. La reĝo Balak promesis sin, ke li malbenu la Izraelidojn. Nia Sinjoro, kiu ne volis elteni tion, metis antaŭ la azeninon sian anĝelon armitan per brilega glavo. Kiel ajn Bileam frapadis la kompatindan beston, efikis nek vipo, nek kolbrido, nek kalkanoj; finfine, permesate de Dio, la azenino ekparolis:

-“ Lasu min, Bileam, ne frapu min. Ĉu vi ne vidas Dion, kiu malebligas min antaŭeniri? “

Tutcerte Dio povas, kaj vi ne dubas pri tio, paroligi ankaŭ ĉiujn aliajn bestojn. Li farus eĉ ankoraŭ pli. Li decidigus uzuriston, pro karitato, malfermi sian zonmonujon.

Tion bone aŭdinte, aŭskultu ĉion, kion mi scias pri la vivo de Renardo kaj Izengreno.

* * * * *

ESTRARO
de
« ESPÉRANTO-GIRONDE »



Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON
Banque Postale :
347771 F Bordeaux



Prezidanto : Joël LAJUS
1 Les Places
33910 SABLONS DE GUITRES
Tel : 05 57 69 26 96
Mail : lajus.joel@wanadoo.fr

Sekretario : vaka posteno

Kasistino : Monique DUSSENTY
76 avenue La Fontaine
33560 CARBON BLANC
Tel : 05 56 06 74 49
Mail : monique.duss@free.fr

